# KIEL DIRI TRIMANIERE

(4-A VIDEOLECIONO)

Celata publiko:
Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

**Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14**

**Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.**

En la Tago de la Laboro Georgo kaj Rita prenis turisman aŭtobuson, por promeni en sia urbo. Ili volis promeni dum la tuta tago.




Dum la Internacia Laborista Tago Georgo kaj Rita prenis aŭtobuson, por traveturi sian urbon. Ili intencis ekskursi en la tuta tago.

En la ferio de la 1-a de majo (Internacia Tago de la Laboro) Georgo kaj Rita eniris en buson, por ekskursi tra sia loĝurbo. Ili deziris turismi tra la tuta tago.



Ili iris per metroo ĝis urbocentra stacio, kie ili forsaltis kaj marŝis piede ĝis la muzeo de arto.

Ili veturis per subtrajno ĝis stacio en la urbocentro, kie ili saltis for kaj piedmarŝis ĝis la muzeo pri arto.

Ili ambaŭ metrois, ĝis ili alvenis en haltejon en la centro de la urbo, kie ili elveturiĝis kaj piediris ĝis la artomuzeo.



Antaŭ ol alveni en la muzeon, ankoraŭ pasante tra movplena avenuo, ili renkontis kolegon el la laboro de Georgo. Ili multe plendis pri la strataj blokadoj.

Antaŭ ol atingi la muzeon, ankoraŭ kiam ili pasis tra stratego plena je movoj, ili renkontiĝis kun laborkolego de Georgo. Ili plende kritikis la trafikŝtopiĝojn.

Antaŭ ol ili alvenis al la muzeo, ankoraŭ trairante intense agititan avenuon, ili kaj kolego laŭ laboro de Georgo interrenkontis, kaj tiam ili multe kritikis la aŭtoblokadojn.



PICEJO






KINEJO


Post kiam la paro vidis eksponadon pri skulptaĵoj de Rodin, ili manĝis picon kaj pli malfrue iris al kinejo, kie ili spektis filmon pri aventuro.

Vizitinte skulptaĵojn de Rodin, ili manĝis en picovendejo kaj poste vizitis kinoteatron, por telespekti filmon de aventuro.

Vidinte ekspozicion de Rodin, ili iris al picejo kaj poste al filmoteatro, kie ili vidis aventuran filmon.




Elirinte el la kinejo, ĉe la vesperiĝo, ili decidis iri al samba rondo de geamikoj, en la tradicia parto de la urbo, por danci kaj babili iomete.



Post la filmo, kiam vesperiĝis, ili havis la ideon iri al amika rondo el sambo, en tradicia kvartalo, por iom sambi kaj interparoli.

Elkinejiĝinte, en la komenciĝo de la vespero, ili interkonsentis iri al grupo de sambemaj amikoj, en malnova urboparto, por danci kaj konversacii dum kelka tempo.



Ankoraŭ antaŭ ol lasi la geamikojn, la paro, akompanate de unu el ili, iris al libera foirejo, por aĉeti kelkajn fruktojn.

Antaŭ ol ili foriris de la amikara rondo, ili, kune kun samboronda amiko, vizitis popolan foiron, por aĉeti kelke da fruktoj.

Ankoraŭ ne lasinte la amikaron, la geamatoj estis akompanataj de unu el tiaj amikoj, por kuniri al popola foirejo kaj aĉeti iom da fruktoj.

Ankoraŭ promenante, la paro vizitis la urban kongresejon, por scii pri la listo de eventoj de la monato. Tiam ili eksciis, ke okazos gravega kongreso pri Medicino.



Ankoraŭ dum la traveturo, ili iris al la kongreskonstruaĵo, por informiĝi pri la monata eventolisto. Tiam ili havis scion pri la okazo de tre grava medicina kongreso.

Antaŭ ol fini la ekskurson, ili vizitis la centrejon de kongresoj, serĉe de la eventotabelo de la monato. Dum ili estis tie, ili sciiĝis pri ege grava kongreso de Medicino.



Lubiciklejo





Multaj biciklantoj biciklas

Rita proponis, ke ili ĝuu, dum kelkaj minutoj, bicikladon en ne malproksima urba arbaro. Do ili iris tien, luis biciklojn kaj biciklis ĝoje.

La amatino de Georgo sugestis, ke ili iom distriĝu bicikle en ne fora urba arbaro. Tial ili eniris en ĝin, lue prenis du biciklojn kaj ĝue biciklis.

Rita faris la proponon, ke ili promenu bicikle kelke da minutoj en proksima urba arbaro. Do, enirinte tien, ili luprenis du biciklojn kaj plezure promenis per ili.



Ili vespermanĝas






Noktiĝis. La geamantoj sidis en restoracio, por vespermanĝi kaj vidi ventro-dancon. Ili manĝis multe, ĉar ili estis malsataj.

Venis la nokto. La geamatoj iris al manĝejo, por manĝi kaj miri dancon de la ventro.

Ili manĝegis pro tio, ke ili malsatis.

Estis la nokto.

La gepromenantoj vespermanĝis en restoracio, kie ili spektis ventrodancon. Ili manĝegis, ĉar ili havis malsaton.



Plenluno (plena luno)

Revenante al la hejmo, ili longe admiris la brilantan lunegon kaj rigardis la tre brilajn lumojn de la urba nokto. Ili estis lacaj, sed feliĉaj.



Kiam ili revenis hejmen, tiam ili longtempe miris la grandan rondan lunon kaj atentis la fortan lumbrilon de la nokto super la urbo. La laceco venkis ilin, sed ili ĝojis.



Lampo

Dum la reveno al la domo, ili ĝue vidadis la brilan plenlunon kaj rimarkis, ke la urba nokto estis tre luma. Ili lacis, sed estis tre kontentaj.

# Organizis: Josenilton kaj Madragoa

